# Reĝo kaj skarabo

Malantaŭ la monto,
malantaŭ la fonto,
veturas sur relo
la reĝa kastelo.
Ĝin tiras du katoj,
ŝov-puŝas du ratoj
kaj ene, sur seĝo,
vojaĝas la reĝo.
Li havas or-kronon,
krak-manĝas bombonon,
veturas tra ponto
al la melolonto.
Ĉi maja skarabo
ekloĝis sur fabo,
en verda dometo
kaj estas poeto.
Bru...bru...bruas rado
dum la veturado
kaj la melolonto
ruĝiĝas de honto
el kaŭzo ĉi nura,
ke kvankam tre pura,
agrabla, sufiĉa,
sed ve, tre malriĉa
kompare kun reĝa
kastelo or-seĝa
'stas lia kabano
sur verda fabkano.
La reĝ' lin konsolas
kaj preni lin volas
en sian palacon,
donaci pajacon,
diversajn ludilojn,
bombonojn, daktilojn.
Sed diras skarabo:
„kabano sur fabo
'stas pli ol alia,
aminda - ĉar mia.
Vi reĝo plej kara,
por mi malavara,
plu reĝu sen laco
en via palaco.
Mi, simpla skarabo
postrestos sur fabo".

